

AVANCO


3/2001

Septembro (XIII-a jaro, Nro. 1)

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio

Zagrebo 2001:

UEA denove metas sian sperton je la dispono de UNESKO
(paĝo 4)



Kubo pretas por la IV-a Nacia Kongreso!

Estimataj:

Vi trovos, ke bedaŭrinde ĉi-numero de nia bulteno aperas sufiĉe malfrue. Tio ŝuldiĝas al diversaj kialoj, inter ili tro da profesia (pangajna, kompreneble!) laboro de la redaktoro kaj manko da taŭgaj kunlaborantoj.

Ĉu la lokaj grupoj kaj filioj ne laboras? Ne. Certe ili laboregas. Kial estas tiel malfacile troveblaj artikoloj pri ilia laboro?

Nu, bone, por ke ne ĉio estu plendoj, ni enkondukas novan rubrikon: El nia Biblioteko, zorgota de **Tineo**; li (aŭ ŝi, ĉar mi ne konas la homon) lasis la kunlaboraĵon sur mia tablo.



Via Redaktoro,
Mag. Alberto García Fumero

Kovrilo: Dumkongrese bonaj amikoj renkontiĝis. De maldekstre dekstre: Atilio Orellana, Eddy Raats, Maritza Gutiérrez kaj Marta Alonso.



XIII-a Jaro, nro.1 (3/2001). Aperas 4-foje jare (mar., jun., sep. kaj dec.) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 539102 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etecsa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Alberto García Fumero / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaĵ al KEA-konto ĉe UEA: kœaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

NACIA ESTRARO

***Maritza Gutiérrez González**
Prez. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Ĝenerala Sekr. Kontrolas internan agadon / Historio, Ameriko, Avanco, La Noktuo kaj Universo

***Martha Alonso Gutiérrez**
Financoj / Resp. pri administraj aferoj

***Alberto García Fumero**
Informado / Hejmpaĝo

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Zorgas pri artaj kaj klerigaj aranĝoj / Biblioteko

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado kaj ILEI-Sekcio

***Manuel Rodríguez Rábago**
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj

KOMISIITOJ

***Roberto Torres Álvarez**
Atento al ailandaj e-istoj

***Juan Lázaro Besada Toledo**
Atento al verkistoj

***Carmen A. Hernández Socarrás**
Faka Agado

***Giezi Rodríguez Perdomo**
Libroservo

***Alberto Rodríguez Pineda**
Administrado

Bone senti sin ĉe demokratia esprimilo

(Ne estas ofte, ke oni simple esprimas siajn sentojn rilate al nia lingvo en niaj revuoj kaj bulteroj, anstataŭ verki artikolojn pri eventoj. Multaj homoj ne kuraĝas kunlabori pro tio, ke ili opinias sin nekapablaj redakti «ion por la bulteno». Sed opinioj estas ege gravaj por ni. Ni ne nur bezonas fakajn artikolojn, recenzojn, sed opiniojn kaj ideojn de nia diligenta kolegaro. Do, sekvu la ekzemplon donitan de Miguel Ángel kaj ek!)

Kiam Vi estas infano, plenkreskuloj ĉiam demandas: kio Vi estos, kiam Vi fariĝos plenkreskulo? La kutima respondo de la infanoj estas: «mi estos doktoro», «mi estos instruistino», mi fariĝos sciencisto», ktp.

Tamen, alvenas la tempo elekti profesion, kaj malofte oni povas sekvi la vojon elektitan dum la infanaĝo: vivo estas vere kompleksa afero...

Nu, tiuj homoj, kiuj bonŝancis lerni lingvojn (sufiĉe malmulte da infanoj elektas la profesion lingvisto, ĉu Vi scias?) konstatas, ke komunikiĝi kun aliaj homoj estas tasko ama. Jes, ĉar sentomanke la tuta ago estos fuŝaĵo...

Inter miloj da lingvoj kaj dialektoj, Esperanto, pro ties efiko kaj facileco, donas kaj gramatike kaj etike la ŝancon esprimi ĉiajn ideojn sur egaleca nivelo.

Krome, ne forgesinda estas tiu kelkfoje primokata «interna ideo», kiu semiĝas en ĉiuj esperantistaj koroj. Tiu interna ideo permesas al ni vidi ĉion pli helan, pli kompreneblan. Ĉiupaŝe ni pli kaj pli konvinkiĝas pri tio, ke la internacia lingvo estas sento kiu parolas, esprimas ideojn kaj amikecon. Ne nur temas pri etoso, kvankam Esperanto konsistigas la plej belan etoson por homaj interrilatoj: temas ankaŭ pri sentoj. Oni vere spertas senton de aparteno, kiam oni parolas la internacian. Tio ne oftas, kiam oni parolas kun eksterlandanoj alian lingvon. Nu, bone, Esperanto estas tia...

Miguel Ángel González Alfonso

Rezolucio de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto Zagreb 2001

La 86-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Zagrebo, Kroatio, de la 21-a ĝis la 28-a de julio, 2001, kun la temo "Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj",

Notinte, ke Unuiĝintaj Nacioj nomis la jaron 2001 Jaro de Dialogo inter Civilizoj,

Memorigante, ke la Esperanto-movado havas longan historion de alproksimigo de la homoj sur bazo de egaleco trans bariloj de kultura diferenco, reciproka malrespekto, kaj eĉ militaj kondiĉoj, jam de la klopodoj de Zamenhof alproksimigi la mondajn religiojn, tra la agado de UEA por reunuigi familiojn dividitajn en la Unua Mondmilito, ĝis nuntempaj elpaŝoj, kiel ekzemple la utiligo de Esperanto por komunikadi inter indiĝenaj popoloj (la t.n. Indiĝenaj Dialogoj) kaj por alproksimigi la korean kaj japanan popolojn,

Atentigas, ke

Kiel internacia lingvo neligita al ŝtataj aŭ etnaj interesoj, Esperanto konsistigas idealan perilon de dialogo inter la kulturoj,

Tra pli ol cent jaroj, la komunumo de Esperanto-parolantoj kreis tradicion de dialogo transnacia kaj transkultura, kio plene meritas nomi ĝin dialoga kulturo.

Efika dialogo postulas respekton al lingva, kultura kaj idea diverseco, kaj bezonas ne nur mensan malfermitecon sed ankaŭ la kapablon aŭskulti.

Aldone al siaj multaj rimarkindaj atingoj, Esperanto havas signifan neekspluatatan

potencialon kiel dialoga lingvo.

Sekve, la Kongreso

— gratulas al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ke ili decidis lanĉi klopodojn senpere alproksimigi kaj interkomprenigi la ordinarnajn homojn, sen kies konvinko la registaroj estas esence senpovaj;

— aparte petas al UN kaj Unesko daŭrigi tiun ĉi kampanjon preter la jaro 2001;

— atentigas, ke tiuj klopodoj postulas proksiman kunlaboron de NROj;

— rekomendas, ke UEA proponu al UN kaj Unesko sian kunlaboron kiel organizaĵo unike bone kvalifikita por difini, en kunlaboro kun aliaj organizaĵoj, la eblojn kaj limojn de tia dialogo, kaj ĝin realigi;


— rimarkigas, ke efika dialogo inter diversaj kulturoj sur lingve demokratia bazo postulas priksideron de la bezono de nova internacia lingva ordo;

— apelacias al ĉiuj parolantoj de Esperanto, ĉiuj lokaj, regionaj, landaj, kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj, kaj ĉiuj, kiuj subtenas la celojn de Esperanto, kunlabori en la daŭra konservado kaj plifortigo de la dialoga kulturo, kiun prezentas Esperanto, kaj daŭre partopreni en la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko krei dialogon inter la civilizoj je tutmonda skalo, kiu estas tiel esenca por la paca evoluigo de la homa socio.

Zagrebo, la 28-an de julio, 2001

Kunsido de la Nacia Komisiono pri Financo

Laŭplanite, la Nacia Komisiono pri Financo, nomumita de la Komitato, kunsidos venontnovembre por kontroli la staton de niaj financoj. Tio jam estas kutima afero, krom la «normala» kontrolado de la financoj fare de la Sekretariino Marta Alonso. La Komisiono konsistas el Yoandra Rodríguez Labrada, Julián Hernández Angulo kaj Pedro Fernández Rodríguez.



... kaj ankaŭ kunsidos la Elektokomisiono

Dum la unua aŭ dua semajnfino (ankoraŭ difinota dato) de decembro kunsidos la elektokomisiono por daŭrigi la laboron rilate al la propono je kandidatoj por la venontjaraj elektoj. La Komisionon, konsistanta el li, Marta Alonso kaj Alberto García Fumero, estras samideano Rafael Cabrera Espinosa.

Nacia Kultura Festivalo: nun en Havano

La Nacia Kultura Festivalo ŝanĝis lokon, kaj nun okazos en Havano, en la kampadejo Celimarina, de la 29-a de novembro ĝis la 2-a de decembro. La lasta Nacia Kultura Festivalo okazis en Santiago de Kubo, en la jaro 1998.



Havana Librofoiro 2002: Ni estos denove tie

Denove Esperanto prezentos sin dum la kutima internacia librofoiro havana. Jam la unuaj demarŝoj estas faritaj flanke de nia asocio, kaj samideanoj Juan Ramón Rodríguez Gómez (ĝenerala sekretario) kaj Alberto García Fumero (sekretario pri Informado) zorgos pri nia budo. Oni ankaŭ planas prelegi pri literaturo kaj Esperanto.

Brugge


Ĉar ŝi ĝuis unikan ŝancon viziti vidindaĵajn urbojn eŭropajn, mi tiris el nia sekretariino pri financoj promeson, ke ŝi ion verketu pri la vidindaĵoj. Jen kion ŝi enmanigis al mi, tutfreŝe...


Brugge estas mezepoka urbo. En la hispana oni nomas ĝin Brujas, sed la vorto Brugge en la flandra lingvo signifas ponto. Tiu urbo estas konsiderata norda Venecio, ĉar tra la urbo iras navigeblaj kanaloj de la rivero Reie. Per boato oni ankaŭ povas viziti la urbon.

La granda maraltiĝo en 1134 estis grava evento por Brugge, ĝar ĝi kunigis la urbon

al la maro; tiel la disvolvo de la komerco de brita lano, kiel monopolo de la entreprenistoj en Brugge, turniĝis en avantaĝon por la loĝantaro.

Je la XIII-a jarcento eksterlandaj komercistoj komencis porti al Brugge siajn varojn, kaj aĉeti la faman flandran ŝtofon. Dum tiu periodo la lokaj komercistoj kunigis por defendi siajn rajtojn flanke de la komerco kaj





Kapelo de la Sankta Sango

petis helpon al la franca reĝo Filipo «La Bela». La batalo nomita "je Oraj Spronoj" metis finon al la konflikto kaj la lokaj komercistoj akiris la rajton partopreni en la urba konsilio.

La XIV-a jarcento estis ora epoko por la Brugge-anoj. Malgrandaj sendependaj entreprenoj pri ŝtofo fariĝis tre prosperaj, kaj famigis la urbon. La vivnivelo plialtiĝis. Dum tiu epoko Brugge estis la plej grava komerca centro en Eŭropo kaj la plej grava financa merkato.

Multaj faktoroj kontribuis al ĝia posta dekadenco; inter ili la sekiĝo de ZWIL kaŭzis grandajn problemojn, ĉar pro tio la urbo

perdis maran havenon kio estis tre grava por la komerco. La eksterlandanoj forlasis la urbon kaj la konkurenco de la haveno Antverpeno fariĝis tre grava.

La industria revolucio signifis la finon de la manfarita laboro; tiel, en 1845, regis malriĉeco. Duono de la popolo vivis almozpeltante, kaj pli ol 10 000 virinoj pene vivtenis sin per farado de brodaĵoj. Brugge estis forgesita de la homoj.

Sub la kvido de Leopoldo la dua estis konstruita la granda haveno de Zeebrugge, kies ekonomika graveco kreskas ekde 1950.

Brugge fariĝis «verda urbo» kaj ĝia speciala atmosfero allogas homojn. Enirante al la urbo oni vidas arbon pli ol 500 jaraĝa



Marmora Virgolino ĉe Nia Sinjorino

kaj dekstre la "Lago de la Amo", kie homoj iras por babilo, promeni, ripozi sur la herbo kaj rigardi la anasojn kaj la cignojn, kiuj tie loĝas. La Ĉefplacon kaj la tutan urbon oni povas rigardi ekde Beffroi aŭ "Atalaya". Tiu turo estas simbolo de la deziro je libereco de la mezepoka loĝantaro. La turo estas 83 metrojn alta kaj datiĝas de la XII-a jarcento. Se oni supreniras ĝiajn 366 ŝtupojn, oni ĝuos belan bildon de la tuta urbo. Ĝia sonorilo datiĝas de 1680, kaj havas diametron je du metroj kaj pezon je 6 000 kg.

En 1887 oni starigis en la placo bronzan monumenton honore al Pieter de Coninck kaj Jan Breydel, popolaj herooj de la batalo je Oraj Spronoj.

Dekstre de la urbodomo oni vidas la kripton de Sankta Basilio. Tiu kapelo je romanka stilo, konstruita meze de la XII-a jarcento, estis dediĉita al Sankta Basilio (329-379), elstara greka patriarko. Supre troviĝas la kapelo de la Sankta Sango, nomumita baziliko de la papo Pio XI-a. La relikvo de la Sankta Sango estas konservita ene de ora relikvujo ornamita per ĵvelŝtonoj, farita de Jan Cradbe en la jaro 1617.

La gutoj de la sango de Jesuo estis alportitaj al Brugge en 1149, de Thierry el Alzaco, post la dua Krucmilito.

La du malgrandaj turoj de la kapelo ŝajnas esti orient-stilaj, sed estas je aŭtenta flandra stilo.

En la urbo ekzistas nekredeble belaj preĝejoj, monaĥejoj, monaĥinejoj kaj beaterio.

La preĝejo de Nia Sinjorino estis konstruita inter la XIII-a kaj la XIV-a jarcentoj. La brika turo estas 122 metrojn alta. En tiu preĝejo estis sepultitaj Maria de Borgonjo



Marta Alonso, sub mezepoka kasko

(1482) kaj ŝia patro Karlo la Aŭdaca (1477). Maria mortis pro ĉas-akcidento; ŝi estis la lasta praido de la Domo je Borgonjo en Flandrio. Post malfermo de la tomboj oni eltrovis gravajn pentraĵojn. En tiu preĝejo oni ankaŭ povas vidi marmoran virgulinon, skulptaĵo de Miguel Angel donacita de Jan Mastroen al la preĝejo.


Promeni tra Brugge transportas vin al mezepoko. Ĝi certe estas vidinda urbo, kie oni povas sonĝi...

Marta Alonso

REAPERIS LA PLEJ ELSTARA HISPAN-LINGVA LERNOLIBRO

Post kelkara interrompo, reaperis en aktualigita eldono la jam fama lernolibro por hispan-parolantoj de la Akademiano Fernando de Diego.

De Diego – la klera vortaristo kaj tradukinto en Esperanton de ĉefverkoj de Cervantes, Lorca, Cela, Márquez, Neruda, Hemingway, Balzac, Maupassant kaj multaj aliaj – instruas en 10 dialogoj (220 paĝoj) ĉiujn aspektojn de la Esperantaj strukturo, gramatiko, sintakso kaj metriko; krome, li proponas al la lernanto Esperantajn parol-turnojn, vortolistojn, multnombrajn praktikajn ekzercojn kun fina ŝlosilo kaj laŭtema indekso.



Kompletigas la verkon informoj pri la praktika uzado de Esperanto kaj pri la E-asocioj en la hispanlingva mondo.

La lernolibro de F. de Diego estas la plej elstara atesto pri la lingvaj kaj kulturaj valoroj de Esperanto. Ĝiaj antaŭaj du eldonoj aperis respektive en 1982 kaj 1992


zorge de la societo "Heroldo de Esperanto" (ne konfuzi kun la nuna samnoma senrajta gazeto), kiu transdonis senpage siajn eldonrajtojn al la Hispana Esperanto-Federacio.

La nuna tria eldono (7,52 eŭroj sen sendokostoj) aperas en la kadro de fakaj prilingvaj libroj de la Madrida eldonejo Gram Ediciones.


Vendas:

Esperanto Liceo de Madrid
San Alejandro 6 4^B-EXT
28005 Madrid
Telefono kaj fakso 91 446 80 79
admin@esperanto-es.net

Guadalupe Sanz
Madrida Esperanto Liceo



Zagrebo en mia memoro



Ĉi jare la universala kongreso de Esperanto iris al Zagrebo, ĉefurbo de Kroatio, lando de pluraj influoj mediteraneaj, nordaj kaj sudaj, naskiĝtero de la famaj kaj belaj hundoj dalmatoj. Tiu ĉi kongreso, la 86-a, havis kiel temon "Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj" sub kies sino ariĝis pli ol mil 400 esperantistoj el proksimume sesdek landoj.

Inter la 21-a kaj la 28-a de julio 2001 mi havis la eblecon renkonti diverslandajn samideanojn, amikojn de Kubo, kolegojn de aliaj radiostacioj elsendantaj en Esperanto kaj ĝui la unikan etoson ĉiam ekzistantan dum la kongresa semajno.

La inaŭguron partoprenis la prezidento de la respubliko Stjepan Mesiĉ, alta protektanto de la kongreso, kiu bonvenigis la kongresanojn kaj esprimis bondezirojn al la kongreso. Ankaŭ partoprenis aliaj altrangaj funkciuloj de la kroata ŝtato.

Jam la 21-an de julio mi partoprenis tuttagan komitatan sesion kie oni analizis esencajn aspektojn de la estonta kaj pasinta laboro de UEA, aprobis la strategian laborplanon kaj elektis novan estraron sub prezido de doktoro Renato Corsetti. Sekve, dum la tuta semajno, komitatanoj plurfoje laboris en komisionoj pri specifaj temoj kaj havis iom da libera tempo por partopreni aliajn programerojn. Mi povis partopreni kunsidon pri Landa Agado sub gvido de la UEA-estraranino Michela Lipari, ankaŭ la kunsidon de radiostacioj kun la geaŭskultantoj, kiun gvidis Barbara Pietrzak el Pola Radio

kaj ankaŭ partoprenis Radio Aŭstrio kaj Ĉina Radio. La kunsido estis sufiĉe amasa kaj oni emfazis la gravecon kaj rolon de la esperantlingvaj elsendoj, ties influon kaj kontribuon al la movado kaj la gravecon de la interretaj elsendoj. La redaktorino de Aŭstria Radio, Katinjo Fetes-Tosegi, volonte esprimis la intencon kontribui kun Radio Havano por disaŭdigo de la kuba voĉo pere de la reto. Alia grava momento estis la kunsido de Ameriko, kie oni esence parolis pri la venontjara kongreso universala en Fortalezo, Brazilo kaj pri la kuba movado.

La 23-an de julio mi partoprenis la kunsidon de EVA, tio estas la verkistoj, kie prezentiĝis nova libro eldonita de eldonejo Iltis. La libro konsistas el rakontoj de diversaj landoj kies aŭtoroj estis rekonitaj tie per medalo kaj diplomo pro la kontribuo farita. Inter ili menciindas la nomoj de nia amiko Eddy Raats el Belgio kaj Alberto García Fumero el Kubo.

Alia tre efika momento estis la kunsido de la komunistoj, kiuj dediĉis sian renkontiĝon al parolado pri spertoj de la kuba movado. La kunsidon gvidis Vilhelmo Lutermano kaj

Vincent Charlot, fervoraj amikoj de Kubo kaj donis al ni, kubanoj, la eblecon raporti pri nia lando kaj movado. Sekvis pluraj demandoj, ĉar la salono estis plena je homoj avidaj scii pri Kubo.

Gravan tempon mi dediĉis ĉi jare al la ILEI/UEA-internaciaj ekzamejoj, kiuj dum du tagoj sesiis kadre de la kongreso kiel tradicie ja okazas. Mi havis la unikan sperton kunlabori kun la hungara doktorino Ilona Koutny, el la universitato de Poznan en Pollando kaj kun la usona samideano Bill Maxey, sekretario de la ekzamena komisiono de ILEI. Kune kun ili mi apartenis al la ekzamenanta teamo kaj aparte ĝuis la laboron kun tiom prestiĝaj esperantistoj por ekzameni novajn kaj promesplenajn samideanojn, kiuj prezentiĝis al la ekzamen-sesioj. El tio fontis ideo kaj devos konkretiĝi plano por okazigi en Havano sesion de ILEI-ekzamenoj kadre de nia nacia kongreso.

Krom ĉio ĉi, mi devas menci la kulturajn programerojn, kiuj estis profesie preparitaj, nome la prezentadon de teatraĵo **La plej longa tago en la vivo de Maria Teresia** kun geaktorj kiaj Vida Jerman, Zarko Saviĉ kaj Ivica Pucar, kaj reĝisorita de Ivica Kunĉeviĉ. Ĝia prezento en la nacia teatro de Zagrebo, vera juvelo arkitektura, donis apartan inspiron al la arta kongresa programo. Ankaŭ la nacia vespero prezentis kroat-tan kulturon, kiu mirigas nin per sia abundeco kaj diverseco. Ekskursoj estis speciale allogaj programeroj kiujn multaj esperantistoj ĝuis dum la semajno. Interalie la tuttaga ekskurso al la apudmara urbo Opatija estis mirinda pro sia natura beleco.


Per tiu ĉi sinteza raporto pri la 86^a UK-o mi ne povas preteratenti ke la loka kongresa komitato sub gvido de Dalibor Brozoviĉ kaj

elstara prizorgo de Spomenka Stimec kiel sekretario, multe kaj efike laboris por ke la kongresa semajno estu plia sukceso en la historio de la E-movado. Jen plia elemento: kongresoj senrezoluciaj ne suke aspektas; do, kiel tradicie la komitato komisiis elstarajn homojn kiajn profesoro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, prezenti projekton de rezolucio, poste aprobitan dum la lasta sesio de la komitato. La rezolucio **atentigas ke kiel internacia lingvo neligita al ŝtataj aŭ etnaj interesoj, Esperanto konsistigas idealan perilon de dialogo inter kulturoj kaj oni konstatas ke malgraŭ ĉiuj siaj rimarkindaj atingoj, la potencialo de Esperanto kiel dialoga lingvo restas signife neekspluatata.** Sekve, la rezolucio apelacias al ĉiuj parolantoj de Esperanto, ĉiuj lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj simpatiantoj de Esperanto, kunlabori en la daŭra konservado kaj plifortigo de la dialoga kulturo, kiun prezentas Esperanto, kaj en la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj krei dialogon inter la civilizoj je tutmonda skalo, kaj plani sian daŭran partoprenon en tiu agado tiel esenca por la paca evoluigo de la homa socio.

Nu, per tiu alvoko finiĝis la 86^a UK-o en Zagrebo kun entuziasma invito al la venontjara kongreso okazonta en la Amerika kontinento, en Fortalezo, Brazilo, kie juna kaj vigla movado sin preparas por bonvenigi la plej grandan eventon de la internacia esperanto movado.

Maritza Gutiérrez

El nia Biblioteko...



Kiom da fojoj Vi plendis pri tio, ke en Esperantujo ne facile troveblas libroj pri scienc-teknikaj aferoj?

Kaj kiom da fojoj Vi honte konstatis, ke Vi ne plene traserĉis nian bibliotekon? Nu, bone, tio ankaŭ okazis al mi, kiam mi deziris legi «ion bonan pri, ekzemple, Fiziko». **Senĝenaj Dialogoj** estas frandaĵo el la popularscienca literaturo (des pli, ke ĝin ni havas originale en Esperanto!) kie oni povas trovi informojn pri fiziko, biologio, evoluo...

La dialoga stilo por popularigo de la sciencoj ne estas novaĵo. Multaj sciencistoj kaj ĵurnalistoj uzadas ĝin de jardekoj. Kaj kompreneble nia sciencpopulariga literaturo ne estas escepto.

Jen la ĉefroluloj: Terano, sciencisto; Pensuto kaj Dubinjo, genevoj liaj. Ili estas spritaj, junaj, ĉarmaj dekkelkjaruloj.

Ili scivolas pri preskaŭ ĉio, kaj ĝuas nekredible freŝan vidpunkton pri la scienco kaj la mondo. Terano ne «profesoras», tio estas, ne terurigas per amaso da faktoj kaj ciferoj al la «publiko»; li simple donas la unuan puŝon por ke la pilko ekruĵiĝu. La ceteron faras la geaŭskultantoj. La ĉeftemoj de la dialogoj estas gravito, tempo, determinismo, materio, genetiko, evoluo, entropio...

Facilplumaj ilustraĵoj «refreŝigas» la okulojn kaj permesas pli klaran komprenon de

faktoj. Aldonaj klarigoj, kiuj rilatas al asteriskoj aperantaj ie-tie en la dialogoj, pliampleksigas la informojn; tiuj, kiuj nur deziras supraĵe informiĝi (tio ne estas pekego, ĉar nek niaj cerboj nek nia libera tempo estas tiom elastaj, kiom supozas Relativeco) povas simple ne legi ilin, aŭ poste foliumi «senĝene». Aliflanke, ili ne estas longaj, kaj restas «klarigoj», ne tedaĵoj. La listo de la konsultita literaturo aperas je la fino; tiu, kiu deziros pli funde studi aferon, komencu per tiaj bazaj verkoj, ĉiam tenante en la kapo, ke libro verkita en la jaro 1971 jam kompreneble bezonos refreŝigon de tiu aŭ alia detalo. Fina noto pri Ortografio kaj Terminologio kompletigas la verkon.

Resume, jen frandaĵo, mi ripetas, kaj mi rekomendas ĝin por niaj meznivelaj lernantoj, multfoje junuloj kiuj plendas pri tio, ke «pri scienco ili nenion trovas». Sed ne sendu ilin amase al la biblioteko ĝuste nun: permesu unu, ke mi redonu la libron!

Tineo

Alberto Fernández

**Senĝenaj Dialogoj
Popularscienca Eldonserio**

No. 4

Stafeto 1971


197 paĝoj

Esperanto:

ĉu

nur

INGVIA



Kvara Nacia Kongreso

de

KEA


Muzeo pri Sciencoj «Carlos J. Finlay»
Havano, de la 6-a ĝis la 9-a de marto,

2002



Ekspozicio kun konkurso de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo

Okaze de la unua Tago de Infanoj en la tria jarmilo kaj Europa Jaro de la Lingvoj, preparas Esperanto-rondeto ĉe Urba Kulturcentro en urbo Vyškov (Ĉeĥio), ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo kunligitan kun konkurso.



Pro nesufiĉa diskonigo (kaj dank' al tio venis malmulte da konkursaĵoj) oni prokrastas la aranĝon (de la 9-a ĝis la 16-a de septembro 2001) al la 23-a ĝis la 31-a de marto 2002. Temo de la deseĝnaĵoj estas **MIA HEJMO**. Povas temi pri via familio, loĝloko, urbo aŭ vilaĝo, en kiu vi vivas kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, regiono aŭ via lando. Por la deseĝnaĵoj estos tri kategorioj laŭ la aĝo de iliaj aŭtoroj: ĝis 8 jaroj, 8-14 kaj 14-18 jaroj. Dorsflanke skribu nomon, naskiĝdaton, adreson kaj nomon de la deseĝnaĵo. Rekomendinda estas partopreno de infanoj el klasoj de Kvazaŭlernejo de Tibor Sekelj.


Deseĝnaĵojn prijuĝos vizitantoj de la ekspozicio, aparte infanoj kaj plenkreskuloj kaj faka jurio. Ĉiu partoprenanto ricevos memordiplomon, la aŭtoroj de la plej bonaj tri verkoj en ĉiu kategorio premion. La formato de la deseĝnaĵoj ne estas limigita. Konkursaĵojn sendu (pli grandajn formatojn prefere ruligitajn) tiel, ke ili venu ĝis la 15-a de februaro 2002 al la adreso: **Esperanto rondeto, MKS, Jana Šoupa-la 4, CZ-682 01 Vyškov.**

Noto: Mallongigo MKS signifas Urba Kulturcentro.

Kontakto perreta por eventualaj demandoj: vojacek@jumbo.ped.muni.cz
(ricevita el Interreto)

Kunlaboro kun «Mondoj»: kuba partopreno

Dum la pasinta Universala Kongreso en Zagrebo oni prezentis la novelaron *Mondoj*, kolekto da noveloj el pluraj mondopartoj, fare de Eldonejo **KLEKS** de Georgo Handzlik. La tekstoj estis donacitaj de la aŭtoroj kun la celo estigi la kutimon, ke dum estontaj UK, oni aperigu tiajn kolektojn. Samideano Alberto García



Fumero partoprenis per la novelo «Li kaj Ŝi». La ceteraj kunaŭtoroj estas: Arosev Grigorij, Arteev Arthur, Bronŝtejn Mikaelo, Camacho Jorge, Dek Liven, Devi Vimala, Ertl Istvan, Garcia Higinio, Gates Ronald Cecil, Gbeglo Koffi, Handzlik Georgo, Heide Zora, Johansson Sten, Karpunina Lena, Kowalska Danuta, Lazian Yenovk Eugene, Ĥowifiska Irena, Malia Carmel, Mielnikov Valentin, Mirska Zofia, Perez-Franco Roberto, Raats Eddy, Rosslor Franz-Georg, Salomon Thierry, Manuel de Seabra, Spielhofer Sheila, Stahlberg Sabira, Steele Trevor, Ŝtimec Spomenka.

Ĉiuj kunaŭtoroj ricevis diplomon, Verdan Laŭron de Eldonejo KLEKS kaj la aŭtoran ekzempleron.


Cele al la eldonado kunlaboris tri redaktoroj: Tomasz Chmielik, Sten Johansson kaj Georgo Handzlik.

Esperanto-ekspozicio

Ĝis la 15-a de decembro, 2001, estos esperanto-ekspozicio en la apoteko situanta en la stratangulo 114 kaj 49, municipo Marianao. La ekspozicio estis kaj «batalita» kaj muntita de samideano Mario Ruiz Karell, kiu tie montras esperantajojn kaj librojn el sia persona biblioteko. (Informis Mario Ruiz Karell)



Korespondi deziras...



Miguel Angel González Alfonso
Cádiz No. 233 apto.5 2do piso, entre
Consejero Arango y Cruz del Padre,
Cerro
Ciudad de La Habana, C. P. 10600
Cuba

La Angulo de la Duboj



- Nu, kio pri tiu -et? – demandis al mi komencanto.
- Pri kio? – demandis mi, miavice.
- Mi tute ne komprenas, kiel oni povas enŝovi tiun afikson «-et» tiuloke. La vorto «etburĝa» ŝajnas al mi nebone elpensita. Sed burĝeto estus afero tute alisignifa. Kion Vi opinias, PIVulo?
- Ĉu Vi dezirus havi lingvon centelcente logika? – ŝercis mi – Esperanto estis kreita de homo, kaj estas parolata de homoj. Devas esti aferoj ne unuavide kompreneblaj, por ke ni povu diri, ke nia lingvo tiom similas al la naturaj lingvoj, ke ankaŭ ni havas nelogikaĵojn.
- Ne primoku min, PIVulo! Bonvolu klarigi al mi tion. Mia poŝvortaro nenion diras pri tiaj aferoj.
- Kompreneble. Ne facilas ĝin klarigi. Temas pri tio, kion Kolomano Kalocsay, tiu kolosa poeto kaj gramatikisto, provis eskpliki per la koncepto «inversa vortefiko» en la Plena Analiza Gramatiko. Laŭ li, ekzistas disfalaj flankelementoj, kiuj ne povas alpreni, kiel memstaraj vortoj, finaĵon konforman al la gramatika karaktero, ĉar tiel ili ne povus sintakse rilati inter si. Ni prenu kiel ekzemplojn la formojn «senforta», «grandkuraĝa», «ĉirkaŭŭrba», «senpova», ktp. Lia ekspliko baziĝas sur tio, ke ili disfalus en (sen forta)a, (granda kuraĝa)a, kio ne estas ebla gramatike, ĉar nek prepozicio nek adjektivo povas rilati al adjektivo.
- Kio do?
- Nur tio, ke tiaokaze ĉiam la unua flankelemento konservas sian gramatikan karakteron kaj difinas per tio la gramatikan vortkarakteron de la dua elemento. Ĉar prepozicio kaj adjektivo rilatas regule al substantivo, *sen* kaj *granda* substantivigas la duajn elementojn *fort* kaj *kuraĝ*. La analizo do estas: (sen forto)-(a), (granda kuraĝo)-(a). Tion oni nomas inversa vortefiko.
- Kiom Vi scias, PIVulo! Sed... ĉu vere Vi faris ĉi analizon ĝuste nun, fulme, por ke mi komprenu? Ĉar tiukaze Vi estus mirinde rapidmensa...
- Jen plia ekzemplo! Ne, fakte mi devas konfesi, ke mi nur parkeris la koncernajn paĝojn de Plena Analiza Gramatiko, ĉar mi devos morgaŭ prelegi pri gramatiko. Vi estis mia unua viktimo...
- Ne mirinde oni klaĉas pri tio, ke Via kapkuseno estas **PAG** kaj ke anstataŭ nombri ŝafidojn por endormiĝi, Vi nombras radikojn...
- Kaj Vi farus la samon, se Vi devus korekti tiom da ekzamenoj kiel mi. Ek, al la klasoĉambro!

PIVulo



Ne papage parolu Esperanton... lernu ĝin!

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro